

M. SCHNELLER

**VIVI
EN
KOMUNUMO**

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

126A 1978 2 FF

V I V I

E N

K O M U N U M O

Ne nova estas la ideo pri komunumo (primitivaj komunumoj, falansteroj de Furje, disĉiploj de Lanza del Vasto, ekonomiaj komunumoj, k.c.). Sed la fenomeno estas interesa pro ties aktuala disvolviĝo. La komunumaj eksperimentoj pli kaj pli multiĝas: kelkfoje efemeraj, iufoje daŭraj (depost 1965). Tiuj eksperimentoj estas tre diversaj laŭ la diferencaj konceptoj de la partoprenantoj.

Skeme oni povas klasifiki ilin laŭ tri grupoj:

1. asocio de familioj, kies ĉefa celo estas pli bona materia organizo, pro la ebleco aĉeti pogrande (do malpli koste kaj kun malpli da temperdo) kaj en rotacio gardi la infanojn, kio ebligas al la patrinoj liberiĝi dumtage.
2. loĝ-komunumo: Oni loĝas kaj vivas komune, ĉiu konservas sian aktivecon ekstere. Tio povas esti unua paŝo al
3. loĝ- kaj labor-komunumo, kun ekonomia bazo.

Fundamentaj principoj de komunumo

libero: Neniu estas devigata resti en la grupo, nek ĝin aliĝi, kaj ĉiumomente ĉiu povas foriri el ĝi, eventuale por eniri en alian.

komunuma sento: Ĉiu devas partopreni la laboron kaj la vivon de la komunumo, respekti la regulon pri higieno kaj sekureco.

hierarkio kaj aŭtoritato estas detruitaj: La vivo estas kolektive planata, la komunumo kolektive mastrumata.

Por fondi stabilan komunumon, necesas komunaj aspiroj (socitransformado!) kaj amikaj rilatoj inter la membraro. Krome, sperto montras, ke tre malfacilas por personoj en stato de psika krizo (kaj arigitaj nur per certa nombro da rifuzoj) fondi daŭran komunumon.

o o

Kial regrupiĝi en la ĉiutaga vivo kaj/en la laboro?

1e, por lukti kontraŭ la difektiĝado de la interhomaj rilatoj.

La funkciaj kontaktoj (de vendisto al kliento, ktp) kaj la akcidencaj (sur la strato, en kinejo, ktp) pli kaj pli multiĝas. Male, malpliĝas la personaj kontaktoj (en kiuj oni konsideras ne la funkcion plenumatan de individuo, sed lian totalecon). Ĝenerale ili limiĝas je la familio kaj je kelkaj amikoj.

En la aktualaj kondiĉoj la individuo estas senĉese agresata, sed sentas sin izolita. Preskaŭ ĉiam li estas devigata repuŝi siajn spontanajn emociojn (timo, malĝojo, korinklino...). Necesas postvivi la konkurencon (konkurenco inter etbienuloj, konkurado por avanci en la kariero...) kaj do ĉiam esti defendpreta, kio inklinigas la homon konstante streĉiĝi kontraŭ la propraĵaj deziroj kaj esti agresema kontraŭ la aliuloj.

Arkitekturo kontribuas izoli la familion en la "kuniklo-kaĝaj" konstruaĵoj.

"En iuj usonaj konstruaĵoj, oni rekomendas al la kandidatoj por supretaĝaj loĝejoj, iri konsulti psikiatron antaŭ ol instaligi. Tiel ili kontrolas, ĉu ili kapablos elteni la streĉecon de tiu ĝoja estonta vivo."

(Desmond Morris - "Le Zoo Humain")

La memservaj supermagazenoj ebligas kontentigi la bezonojn sen interhoma komunikado.

Komunumo estas la bazo por forigi la izolitecon de l'individuo, ĝi alportas al siaj membroj psikan malstreĉigon.

Konkuradon anstataŭas kunlaborado, eĉ por solvi personajn problemojn. La komunumo ebligas privilegi-ajn kaj multoblajn interpersonajn interŝanĝojn. Ĉiu povas lerni rekoni siajn proprajn repuŝitajn bezonojn kaj la bezonojn de aliuloj.

2e, por detruigi la tradicie subpreman strukturon de la familio.

La familio preparas la infanojn submetiĝi al la socio. Ĝi estas la plej grava instanco por integriĝo en la sistemon, ĉar ĝi formas pasivajn karakterojn (sekse subpremo, aŭtoritateco).

La meza etfamilio produktas labilajn estaĵojn, fiksitajn al neraciaj aŭtoritatoj; ju pli la memo estas malforta, des pli alkroĉiĝas la individuo al la kolektivaj potencoj: ŝtato, nacio, raso...

Komunumo reprezentas strebadon eskapi la tradician familion. Malperoe de l'aŭtoritato ebligas plifortigon de la personeco. En la formoj de kolektiva vivo, la individuoj povas esprimi novajn, personajn dezirojn.

3e, por favori la movadon por virina liberiĝo.

Fiksante konvenciajn rolojn, oni donas al la viro

2e, kontraù la pasiveco de l'konsumanto.

En la ordinara vivo, la materiaj devigoj reduktas la tempon kaj la fortojn disponeblajn por pli kreivaj aktivecoj. La domaj aĉetoj reprezentas grandegan parton de la buĝeto, kiun do oni ne plu povas uzi por akiroj pli profitaj al la persona florado (konstanta kreado de novaj "bezonoj").

En komunumo oni provas liberigi la kreivajn fortojn, reinventi la homan kreadon, anstataù konsumi ĉion laŭmodan, inkluzive la kulturajn valorojn.

3e, kontraù la brutiĝo de l'laboristo, kontraù la mensa sklerozo per la instigado, la stimulado.

En sia laboro, la homo estas funkcio, specialigita produktfaktoro. Tio validas ne nur por la laboristoj kaj malsuperaj oficistoj, sed ankaù por la universitatuloj kaj la kadroj en la entreprenoj.

La interhomaj rilatoj ofte estas antagonismaj. La alia estas la kontraùulo kontraù kiu necesas lukti por certigi la propran socian supreniron.

En grupo, ĉar la elspezoj estas reduktitaj ĝis la minimumo, la doma ekonomio ebligas al ĉiu labori nur laŭnecese - kelkajn horojn ĉiutage.

Eblas rotacie ĉesigi ĉiun profesian aktivecon dum certa tempo, kio permesas disponeblecon, ĝisdatigan lernadon, vojaĝojn, ktp. Se la komunumo plenumas kolektivan produktadon, la individuo povas havi superrigardon, kontentigan por la homa spirito.

Forigi la labordispartigon povas ebligi novajn metilernadojn, neblajn pro la premo de l'socio.

4e, kontraù la enkaĝigo de la "neproduktivuloj".

Konstrui specialajn domojn por la maljunuloj, kiuj iĝis neproduktivaj, kontribuas disigi la generaciojn. Tiu situacio ne ekzistas en la pli primitivaj socioj, kie la etaj familiaj ĉeloj estas ne tiel multaj kaj

ne dividitaj laŭ aĝ-klasoj. La grupo povas transpreni la tutan prizorgadon de unu aŭ du izolitaj maljunuloj, unu aŭ du malfortuloj. La integriĝo de l'maljunuloj (kaj de l'kripluloj) en la komunumojn parte solvus la problemon pri la maljunuloj.

5e, kontraŭ la ekonomia, socia, intelekta, afekcia malegalecoj.

La komunumo ne neas la individuon, ĝi altigas ĝin.

La socio forĵetas membrojn, kiuj strebas sinceri kun si mem, kiuj ne ludas la ludon. Male, la komunumo ebligas al la homo esti si mem, flori en etoso el egaleco kaj reciproka konfido.

6e, kontraŭ la skleroza edukado en la familioj kaj en la "lernejoj-malliberejoj".

Tio estas ĉefa punkto.

La aktuala edukado sur ĉiuj ŝtupoj tendencas, per truddevigaj metodoj, adaptigi nin al la socio kaj savi ties valorojn (obeemo kaj ĝentileco de l'infanoj rilate la plenkreskulojn, respekto al la superuloj, kaj, fronte al la infanoj kaj malsuperuloj, oni estas mem aŭtoritato!)

La tradicia edukado subpremas la inventemon, kiu estas danĝero por la establita sistemo. Neniu diskutado. La mastro disdonas la scion. La agres-energio de la infano tiam estas repuŝata: ĝi direktiĝas kontraŭ la individuo mem, aŭ fariĝas bazo de agresemo kontraŭ la sociaj "propekaj virkaproj" (Judoj, ekzemple...)

La infanoj sufokiĝas en la etfamilio. Nova formo de infanedukado estas unu el la ĉefaj celoj de la komunumoj. Ĉiu plenkreskulo estas parenco de ĉiu infano. Tio fleksebligas la fiksadon de la infanoj al siaj gepatroj. La infanoj havas la eblecon intense rilati kun aliaj plenkreskuloj ol siaj gepatroj.

La komunuma vivo alportas ŝanĝiĝon en la strukturoj de la tipa konflikto de la Edipa komplekso. Ĝi ebligas al la infanoj konscii la ambaŭvalorecon de

Koncerne la seksan edukadon, temas ne nur pri tolero sed pri agnosko al la infana sekseco.

En la komunumo, la infano nature akiras la konscion pri la aliulo, la respekton al sia persono kaj al la aliaj. Tio, kio kreas malfacilon al plenkreskuloj, estas tute natura por la komunumaj infanoj. Ili edukigas kune, tuj respektas unu la alian kaj ne konas proprieton nek egoismon.

o o

Sur kiuj kampoj oni povas travivi la partoprenon

.....

en komunumo ?

.....

1e, morala: Ĉiu respondecas pri ĉiuj kaj ĉiun juĝas ĉiuj.

2e, ekonomia: mono, salajroj, propraj posedaĵoj.

Kiam la persono estas konsiderata en sia tuteco, kaj ne plu kiel funkcio, la ideo pri diferenca salajrado ne plu estas komprenebla. Povas do okazi, same kiel en komunumo kiu vivtenas sin per propra produktado, absoluta komuneco de l'havaĵoj. Ju pli granda la integriĝo en la komunumo, des pli vasta la financa kolektivigo.

Sed, komence, eble estas relative malfacile administri la tutan monon kune. Se por kelkaj membroj la salajro estas la nura rekompenco por ilia laboro, ili eble trovos neelteneble meti la tuton en la komunan kason.

Oni do povas doni parton de siaj enspezoj (fiksitan sumon aŭ procenton) por la nutrado, la loĝado kaj aliaj pagoj (telefono, ktp).

3e, seksa:

Vasta lukto okazas por senkulpiĝo de la sekseco. Sed plej varias tio, kion la homoj opinias pri seks-

eco kaj tio, kion pri ĝi ili atendas de la komunumo.

Aparta kazo estas la studentoj kaj metilernantoj, por kiuj la deziro pri pli libera sekseco estas la ĉefa motivo por kunloĝado. Sed tiu kunloĝado, pro diversaj kialoj, ne povas esti daŭra.

Plejofte, ĉiu havas sian ĉambron, kie (li) ŝi povas apartiĝi dumtage aŭ tranokti.

En kelkaj komunumoj (Danio) ĉiuj devas dormi en la sama ĉambro. Tiuj komunumoj praktikas kolektivitan seks umadon ("podekkvina geedziĝo"). Tio ofte okazas en la komenco de komunumo, sed ĝenerale ne longtempe. La plimultaj membroj rifuzas la seksan apudecon kaj preferas vivi en paroj, eventuale disigeblaj.

La vivo en grupo kreas la bazon por amrilato inter du personoj, kiu estas pli kontentiga kaj pli daŭra. Ĵaluzo malpliigis (aŭ malaperas) kiam oni komprenas ties originon (la infanaĝon). La grupo kreas bonan, logikan kadron por kontentiga rilato, ĉar ĝi malhelpas la gekunulojn enprofundiĝi en falsajn ideojn kaj en senton pri peko.

Oni kolektive pritraktas la eventualajn konfliktojn. La gekunuloj povas klarigi siajn motivojn. Ne estas privata sfero por kaŝi la konfliktojn. La longdaŭrecon de geedzeco garantias la ekstera subpremo. Se homa interrilato baziĝas sur la vera profito de la kunulo, ĝi havas pli da ŝancoj daŭri. Sed pli facilas disiĝi laŭ racia maniero kiam la voluptaj interesoj malpliigis.

Ĉar oni planas la naskiĝojn interne de la komunumo, oni tiel haltigas la troloĝatecon.

4e, intelekta, permana:

Stariĝas la problemoj pri la respektivaj kulturaj niveloj. Ĉiu alportas sian scion. Eblas organizi kursojn. Tre gravas la diskutadoj. Vivas en sama komunumo tre diferencaj personoj. Tio necesigas senĉesan eduk- kaj kritik-procezon, per kiu la komunumo perfektigis kaj plifortiĝas.

Kiuj estas malpli naturdotitaj aŭ malpli spertaj, tiuj senĉese lernas. En bone komprenita gruplaboro regas vera kunlaborado inter tiuj, kiuj scias, kaj tiuj, kiuj lernas. En alia kazo, la sciantoj estas tiuj, kiuj lernos...

Jam videblas la sukceso en multaj komunumoj: re-
gresis egoismo, hipokriteco, aŭtoritateco, vantemo ;
progresis la komunuma sento, la responsemo kaj la
kamaradeco.

o o

Optimuma loĝeja strukturo "oooooooooooooooooooooooooooo"

La burĝa arkitekturo ne liveras la necesajn bazojn por kunloĝado, la ŝanĝiĝoj en la interno ne ĉiujn problemojn solvas.

Nepras, ke ĉiu komunumano havu propran ĉambron, en kiun li povu retiriĝi kiam li tion deziras. Laŭ la nombro da personoj, necesas unu aŭ pluraj komunaj salonoj (por kunvenoj, laboro...). Krome, kuirejo, higienaj instalaĵoj, eventuale metiejo, ktp...

Hipiaj komunumoj mem konstruas siajn loĝejojn per malnovaj veturiloj kaj aliaj materialoj.

La elektota geografia loko dependas de la naturo de la komunumo; aŭ kamparana komunumo, aŭ urbana.

Kamparanaj komunumoj instaliĝis en malnovaj farmoj (en Francio, en forlasitaj vilaĝoj), kie oni kultivas nature, sen uzi ĥemiaĵojn, por eviti la difektadon kaj la polucion al la naturo kaj al la nutraĵoj.

Tie okazas vera kontakto inter la homo kaj la naturo. (Oni aludas pri nov-Rousseau-ismo).

Multaj kamparanaj komunumoj vivas krome per metioj: kudrado, teksado, ledaĵoj, juveloj aŭ aliaj aktivecoj (muziko, teatro, ĵurnalismo, eldonejo, librovendejo, trinkejo - kiu povas esti kunvenloko...)

pri sia eksperimento...

° °
°

Politika laboro

Ĉu komunumo en si estas sufiĉe revolucia fenomeno? Aŭ ĉu ĝi estas la deirpunkto por politika laboro? Ĝi preferas estas bazo, apogilo al politika organizo.

Ĉar en kolektiva agado la timo pro subpremo parte malaperas, la grupo estas forto, kiu povas servi al komuna politika agado. Per tiu agado eble oni povas pli bone vidi la personajn problemojn, kiuj stariĝas por iuj membroj. La psikaj konfliktoj povas sublimiĝi per komuna politika laboro kun preciza celo.

Ekzemple:

En Usono "People's Commune" (Popola Komunumo) eldonas gazeton, kiu provokas la armeajn instancojn (per propagando al la soldatoj forirantaj al Vjetnamio) kaj la policon (denuncante la militekscursojn kontraŭ la Nigraj Panteroj).

En Francio komunumo entreprenis instrui la francan lingvon al Jugoslavo, arbhakistoj en la ĉirkaŭaĵo, kaj kies vivkondiĉoj estas mizeraj.

En Svedio iuj komunumoj sendas nutraĵojn kaj vestojn al evolulandoj.

.....

Malfideme la socio konsideras tiujn komunumojn, kiuj provas rezisti la kutiman manipuladon. En ili oni vidas amason da moralaj kaj psikaj malbonaĵoj. En la gazetaro aperas artikoloj, en kiuj oni emfazas la aspekton de seksa kunvivado (tio estas bone vendebla, oni ja scias kial), la malpurecon, ktp...

La juraj formoj ne konvenas por la komunumoj. Tial,

por eviti malfacilaĵojn kun la oficialaj instancoj , necesas akiri bienon aŭ havi sufiĉan juran bazon.

La personoj, kiuj deziras vivi en komunumo ĉefe estas junaj (malpli ol 40-jaraj) kaj preskaŭ ĉiam urbanaj gejunuloj. Tio estas fenomeno, kiu tuŝas ĉefe la studentojn, universitatulojn, anojn de profesioj liberalaj aŭ rilatantaj la socion kaj la kulturon.

Sed nun konsistiĝas kolektivoj el metilernantoj (Germanio).

Vere, estas multaj malsukcesoj, kiujn la gazetaro uzas por pruvi la neefektiveblon de tiaj projektoj ("Patrino Helvetio, ci povas dormi trankvile" , en "Neue Zürcher Zeitung").

Vere, ne ĉiuj problemoj solviĝas subite, kaj eĉ aperas novaj. Sed eble ke, kiel skribis psikosociologo Michel Baufret: "En la jaro 2000, vi povos rakonti al viaj infanoj, ke foje ekzistis viroj kaj virinoj, kiuj vivis laŭ paroj kaj konsistigis familiojn..."



Pri "Vivi en komunumo" :

Tiu laboro estis farita en lernejo en la kadro de kurso pri sociologio . Laŭ la konsiloj de la profesoro , ĝi estas strukturita laŭ skemo ellaborita de C. P. O. (Okcidenta Protestanta Centro) , kiu aperis en la revuo "Lettre" , februaro 1971.
Ĝin esperantigis kdo Kribo.

Bibliografio

Libroj

BOOKHAGEN, Christl; HEMMER, Eike (etc.)
Kommune 2. - Berlin, 1969.

HOLLSTEIN, Walter.
Der Untergrund. - Berlin, 1969.

K u r s b u c h 17. Frau, Familie, Gesellschaft.
- Nördlingen, 1969.

MORIN, Edgar.
Journal de Californie. - Paris, 1970.

MORRIS, Desmond.
Le zoo humain. - Paris, 1969.

Artikoloj aperintaj en

"Actuel" , oktobro 1970.

"Choisir" , februaro 1971.

"Community market" , katalogo 1970-1971.

"Esprit" , marto 1971.

"Esquire" , septembro 1971.

"Le Nouvel Observateur" , septembro 1971.